Le Sud Ypres (19400210)

Chronique Espérantiste

MORALA RAPORTO de la FREZIDANTINO

Prezentita, la 23an de januaro, je laJara Generala Kunsido de « Reĝa Societo Bruĝa Grupo Esperantista ».

En la jaro 1891, Dro Zamenhof skribis en « La Esperantisto » : « La graveco de nia afero estas nia fera ŝildo kaj laborado, konstanteco kaj pacienco, pacienco, konstanteco kaj laborado, konstanteco, laborado kaj pacienco estas fortoj, per kiuj ni devas venki. » — Pri tiu ĉi difino, mi deziras komenci mian raporton : ĝi estas pravigo de nia konduto ekde 1902, konfirmo de ĉio, kion ni plenumis dum la jaro 1939, instigilo al daŭrigo de nia sintenado. — Neniam mi sufiĉe rediros al vi ke, se ni volas sukcese propagandi por Esperanto, ni devas tion fari laŭ la konsiloj, la ekzemplo, la vivo, la verko kaj la « Esperanto » de Zamenhof mem. — Ni estu pioniroj, ni estu apostoloj, ni disvastigu kun respektego la Zamenhofan ideon — Vere, Esperanto estas ĉies proprajo, tamen al ni ne estas permesite tuŝi al ĝi por ĝin difekti : ni ne adaptu Esperanton al ni, sed ni submetiĝu al la ideo, al la idealo de Zamenhof, lingvo-kreanto. — Kie ni povas trovi resumon de tio, kio estas necesa por venki ? — Ciuj el ni tion scias ! Ciuj el ni tion neniam forgesos ! — Estas en la teksto de nia himno esperantista « La Espero ». — Estas en tiu himno ke ni ĉerpis la forton kaj la volon per kiuj ni konservis la vivon de nia kara grupo. — Kiel floris « tiu nova sento » en nia grupo ? Per « sankta harmonio » dank'al « pacaj batalantoj » inter kiuj regis « sankta amo » kaj kiuj formis « rondon familian », per « laboro paca » por « eterna beno ». Tiele, en Bruĝo, nia grupo venkas ! — Cu vi komprenas kial mi insistas por ke, ĉiumarde, ni kantu ĥoce nian himnon ? Tiu himno ekflamigas nian ardon al batalo ! Gi konservas nian celon al la venko sur la rekta vojo ! — Kial Esperanto ĝis nun ne venkis ĉie ? — Cu post tiu ĉi milito ĝi fiaskos ? — Esperanto ĝis nun ne venkis :

1e) ĉar multaj, multaj esperantistoj ne sekvis la vojon montritan de Zamenhof, ili ne legis lian verkon, ili eĉ ne kantis nian himnon !!

2e) ĉar pacigilo inter popoloj ne povis dissaltigi la obstinajn barojn en turmentita Eŭropo de 1918 ĝis 1939 ! Se nenio nek neniu kapablis savi la pacon, kial oni povus postuli tian miraklon de Esperanto ?

3e) ĉar multaj kleruloj timas lingvon internacian, kiu ne estante esprimilo de iu civilizeco, povus helpi al la invado de la bolŝevismo.

Cu Esperanto fiaskos post la nuna milito ? — NE... se Francujo kaj Britujo opinias ke Esperanto estas la ŝlosilo, kiu helpos ordigi kaj unuigi la novajn ŝtatojn de Eŭropo. Kion ni, esperantistoj, devas fari por konvinki ilin pri la taŭgeco kaj utileco de Esperanto. èNi ja scias ke en vivas.)Kion ni devas fari por akceli la venkon ? — Kiel esperantistoj : daŭrigi nian sintenadon, kiel mi al vi klarigis en la komenco de tiu ĉi raporto. Kiel Belgoj : resti ĉiam fidelaj al nia Reĝo, Honora Prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista », al nia lando, Belgujo, al nia trikolora standardo, al nia moto « Unueco donas fortecon ». — Kiel Bruĝanoj : ami nian grupon, ion oferi por ĝia ekzistado, viziti adi la kunvenojn, partopreni en la festoj... helpi ! Ni memoru ke oni juĝos Esperanton laŭ la personoj, kiuj ĝin parolas kaj disvastiges. Tial, malcedeme ni esprimu, en ĉiuj cirkonstancoj, nian amon al nia Reĝo, simbolo de nia patrolando ! — Zamenhof estu nia modelo en nia grupo, ni estu modelaj Belgoj en nia lando ! — Nia grupo, en tute verdeco, estas 37 jara, senlace kaj senhalte ĝi instruas kaj propagandas ne forgesante la fundamentajn principojn de siaj Honoraj Prezidintoj Sroj Witteryck kaj Botwood kaj de sia Honora Prizidanto Sro Dervaux. — La grupo apartenas al ĉiuj membroj, ĉiuj zorgu pri ĝi

(suite en bas de la colonne précédente)

La komitatanoj kaj la membroj vivas en harmonio sub la sankta signo de « L'Espero ». Bruĝa grupo estu beno por Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj por Internacia Esperanto-Ligo ! Alten ni tenu la verdan standardon ! Portu ni ĉiam la verdan stelon ! Parolu ni Esperanton !